

LA LABOROJ DE LA 14a INTERNACIA KONGRESO DE SOCIOLOGIO

Sub la aŭspicioj de la Internacia Instituto de Sociologio (Roma, Via Terme Diocleziane, 12) oni ĵus eldonis la Aktaron de la 14a Internacia Kongreso de Sociologio, kiu okazis en Romo dum septembro 1950. Tre interesa kolekto je grava scienca valoro pro la kunlaboro de elstaraj mondfamaj scienculoj kaj kompetentuloj. Inter la temoj kiuj meritas apartan mension, ni nomas la raporton de Prof. Corrado Gini, Prezidinto kaj iniciatinto de la Kongreso — sub titolo „Sociologio kaj ekonomio”, kaj la diversajn kontribuojn de prof-oj Papi, Vito, Lasorsa, Galvani, De Petri Tonelli, Balvi, Castellano, D'Agata, Aramon y Serra, Babel, Biscaretti di Ruffia, Camboni, Carreras y Artan, Federici, Findikoghe, Frango Ikibane, Günther, Ogburn, Povina, Sanchez Agesta, Savorgnann, Sellin, Tagliacarne, Troncoso, Tranchez, Ülken, Pompili, Salvatori, Cali kaj multaj aliaj scienculoj.

La aktaro sumas kvar volumojn in octavo laŭ la jena enhavo:

- I-a vol. - Paroladoj, rememorigoj, protokolo de la kunsidoj, nomaro.
- II-a „ - Esploroj pri komparo de la vivoj urba kaj kamparana ankaŭ laŭ medicina-biologia vidpunkto.
- III-a „ - Generalaj kaj teoriaj konceptoj - Ekonomiaj, teknikaj, metodologiaj kaj didaktaj esploroj.
- IV-a „ - Historiaj, arkeologiaj, juraj kaj ekonomiaj esploroj.

Inter ĝiaj ĵusaj aktivajoj la Internacia Instituto de Sociologio kalkulas la gravan Kongreson en Istambul. La Instituto havas la altan meriton grupigi studemulojn kaj pensulojn el ĉiuj landoj, kaj estas la incitilo de la science sociologiaj penso kaj progreso. Ĝian Prezidanton, Prof. Corrado Gini kaj liajn eminentajn kaj aŭtoritatajn kunlaborantojn atingu la bondeziroj kaj la dankoj de la studemuloj, kiuj estimas kaj aprezas la socialan progreson, kaj oni esprimu la esperon ke Esperanto trovi en la scienca movado veran motivon por alproksimigi homajn mensojn.

D-ro Luigi Cali, ĉeestinto,
Asistanto pri Ekonomio kaj sociaj sciencoj en la Universitato de Catania (Italio).

667.6/.8(063) (4) „1953” (492.61)

ESPERANTO ĈE KONGRESO DE FATIPEC.

Dum la 2-a Kongreso de FATIPEC (Federacio de asocioj de teknikistoj de la industrio de farboj kaj similaj produktoj en kontinenta Eŭropo) en la nederlanda banurbo Noordwijk, 18.-22.5., kiun partoprenis 400 scienculoj el

Eŭropo kaj Ameriko, la ĝenerala sekretario D-ro W. J. Nijveld, kiu estas nia samideano, kaptis la okazon, atentigi pri la ekzisto de Esperanto. Ĉiuj kongresanoj trovis inter siaj dokumentoj propagandilon de H. Bakker: dentradojn kun la oleujo „Esperanto”, kun la adresoj de landaj asocioj dorsflanke. La kongresa prezidanto D-ro J. Hoekstra, vicdirektoro de la kompanio „Philips-Roxane” en Weesp, tre favora al nia ideo, komencis sian malferman paroladon per kelkaj vortoj en Esperanto. Same faris la ĝenerala sekretario en sia parolado. Krome, sur la sekretaria ĉambro troviĝis tabuleto kun la vortoj: „Esperanto parolata.” Unu el la parolintoj petis la sekretarion, aldoni al lia parolado resumon en Esperanto; tio okazis. (Vidu en ĉi tiu numero sub Recenzoj: „Natural versus accelerated paint storage tests.”)

Post la kongreso pluraj fakaj revuoj diverslandaj menciis Esperanton en siaj kongresraportoj. Ekz. en artikolo „Rerigardo al Noordwijk”, en la nederlanda „Verfkroniek”, Esperanto estas trifoje menciita.

Samideanoj, kiam vi estos en simila situacio kiel D-ro Nijveld, imitu lian ekzemplon! Ĝi kostis preskaŭ neniom, kaj ĝi tute ne renkontis mokon; kontraŭe, oni komprenis, ke la kostoj de la preparo de tia kongreso estus eble nur duono de la nunaj, se la tuta korespondado kaj ĉiuj presaĵoj povus esti en unu lingvo anstataŭ en pluraj. (Laŭ Heroldo de Esperanto.)

52 : 535.1 : 539.14

DU PROBLEMOJ DE LUMDISVASTIGO EN LA MONDSPACO.

de Prof. Dr. Bruno Thüring,
Karlsruhe, Germanujo.

1. En la jaro 1801 H. Soldner publikigis artikolon enhavantan kaj fundantan unuafoje la penson, ke la fiksastraj lumradioj devas kurbiĝi proktime ĉe la suno, tiel ke la observita sfera loko de fiksastraj estas delokita for de la centro de la sunrondaĵo. Ĉi tiu penso estis logika sekvo de la Newton-a korpuskula lumteorio: Lumkorpusklo ĉe la suno preterfluganta estas altirata per gravito kaj moviĝas laŭ hiperbolo, kies fokuso estas la suncentro. Laŭ la principoj de la Newton-a mekaniko okazas angula delokiĝo de 0,87” ĉe la sunrando. Alekstere tre plimalgrandiĝas ĉi tiu angulo laŭ difinita leĝo. Sed tian malgrandegan angulon tiam oni ankoraŭ ne povis mezuri, do la penso de Soldner havis nur teorian pravecon.

Krome en la sekvintaj jardekoj de la 19-a jarcento la Newton-a korpuskula lumteorio estis anstataŭigata de la ondado-teorio de Huygens-Presnel, laŭ kiu la lumoj estas ondo interne de substrato nomita „etero”. Ĉi tiu koncepto graviĝis sekve de la starigo de la Maxwell-aj fundamentaj ekvacioj elektromagnetikaj. Grandaj sukcesoj de tiu teorio okazis dum samtempe kreskis logikaj malfacilaĵoj de la nocio „etero”. Ĉe tio la problemon